

PROPONO DE ILEI GVIDI KONGRESAN TEMON DE ESTONTA UK

ILEIi volas proponi la sekvan temon unuavice por la UK en Seulo en 1994.

Kiuj, kial kaj kiel lernas Esperanton en la mondo?

Sociologia konsisto de la lernantoj de Esperanto; motivoj kaj celoj por lernado; implicoj por varbado kaj por instru-metodoj kaj -lerniloj.

Anticipe okazu en Koreio, kelkaj Europaj landoj kaj eble en Amerika lando unueca sociologia enketo inter lernantoj de Esperanto. i.a. pri:

1. lernejoj atingoj, klereco, profesio, scioj de aliaj lingvoj ktp.
2. motivoj kaj celoj por la E-lernado. Kiel informita pri E. Kiom taugis la sekvita kurso. Kiom rolis la 'interna ideo'.

Simila enketo okazu inter la partoprenantoj de la UK por posta analizo.

La rezultoj de la anticipaj enketoj estu analizitaj kaj prezentitaj per ekspoziciitaj tabuloj kaj estu la bazo por prelegoj kaj diskut-grupoj. Tiu interalie traktu la temojn:

1. Kiuj estas la implicoj por la varbado?
2. Kiuj estas la implicoj por la elekto de instru-metodo kaj lerniloj.
3. Cu tipa movada aktivulo venis al E tra kurso au alimaniere, ekz. per memstudo.
4. Kiel nia instruado povu pli efike gvidi kursanojn poste praktike uzi la lingvon au farigi movadaj aktivuloj.

Ekspozicio de lerniloj povas akompani la duan subtemon.

Estus precipe interese disvolvi tiun temon en ekster-europa kongreso, car pli reliefigu la diferencoj inter la kontinentoj. La korea realeco versajne tre diferencas de la europa, pro la kvanto de varba kaj instrua agado inter studentoj de universitata ago.

ILEI povos organizi enketadon en Koreio, Cinio kaj Usono pere de la propraj estraranoj, krome ni enketu en almenau unu okcident-europa kaj unu orienteuropa lando.

Se ILEI organizos la temon, ni enplektos fortojn de ekster ILEI (precipe sociologoj), kaj en tiu jaro ne okazus 'Tago de la Lernejo'.

BARCSAY Zsuzsa; Stefan MacGILL. Budapesto, 24 mar 92.